
La vibradon de konstruelementoj dum laboro de maŝinoj kun dinamikaj ŝarĝoj oni mezuras per mana aparato (ilustraĵo 7), kiu precize kaj klare enskribas osciladon kun amplitudoj de 0,05 ĝis 6 milimetroj kaj kun frekvenco de 5 ĝis 100 osciloj minute.

Dum projektado kaj konstruado de vibroizolitaj fundamentoj necesas **konsideri lokajn hidrogeologiajn kondiĉojn.**

Por ke vibroizolitaj fundamentoj funkciu bone, necesas de tempo al tempo kontroli iliajn konstruelementojn kaj forigi aperantajn difektojn.



Ilustraĵo 7 — Mana aparato por registri la vibradon.

Nuntempe en multaj fabrikoj estas uzataj vibroizolitaj fundamentoj sub forĝantaj kaj premtranĉantaj martelegoj kun pezoj de frapantaj elementoj de 150 kilogramoj ĝis 25 tunoj.

Multaj fabrikoj ĉiujn siajn maŝinojn kun dinamikaj ŝarĝoj instalas sur la vibroizolitajn fundamentojn kaj en unusola fabriko por martelegoj kun frapantaj elementoj 1, 2, 3 kaj 5-tunaj kvar fundamentaj blokoj estas instalitaj sur la fundon de sola subfundamenta kestego.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 18. n-ro 3 (1967)

## EL LA FAKOJ

**sciigoj de la Terminologia Centro de I. S. A. E.**

**(ISAE-TC-125)**

(La fakoj estas envicigitaj laŭ UDK. De nun ni uzos la simbolojn por lingvoj denove laŭ la esperantaj nomoj, do: A angla, F franca, G germana, H hispana, I itala ktp.)

53 **Fiziko.** — S-ro J. C. Wells, 33 Rye Hill Park, London S. E. 15, estas kompilanta vortaron Eo-A kaj A-Eo baldaŭ eldonotan kiu ankaŭ enhavas sufiĉe multe da terminoj de FIZIKO.

535.82 : 578.6 : 616-076 **Mikroskopio.** — En Marto 1966 aperis post longe en la sekretariejo de ISAE la TERMINARO PRI MIKROSKOPIO kun fakaj tekstoj de Prof. E. Balech, Casilla de Correo 64, Necochea, Argentino, — ilustrita de C. Wappers. Eld. de TC de ISAE per monrimedoj de la Fondaĵo 'Scienco'. Stencile multobligita, 26p., 21,0 x 29,8 cm; 2 desegnokompleksoj; havebla ĉe TC de ISAE kontraŭ libervola donaco al Fondaĵo 'Scienco' sendenda al la respektiva landa delegito de ISAE.

536.7 **Energetiko, termodinamiko.** — S-ro Onorio PUIA, str. Democratiei 24, Ploieşti, Rumanio, ĉefinspektoro de Energioinspekcio, estas preta kunlabori en la fako energetiko kaj termodinamiko (bv. ĝustigi la fakon, vd. Sc. Rev. **16**, p. 6 kaj p. 10).

55 **Geologio.** — S-ro J. M. Mabesoone, Escola de Geologia, Caixa Postal 2492, Recife (Pe), Brazilo, promesis dediĉi sin al terminara laboro pri geologio, en kunlaboro kun siaj kolegoj Dudich, Gérard kaj Kavka. Li proponis starigi komisionon por diskuti dubajn terminojn, eventuale en kunlaboro kun la Akademio kaj ISAE.

61 **Medicino.** — La sciigoj pri la BAZA MEDICINA VORTARO — BMV — en Sc. Rev. 17, p. 70, laŭ deziro de A. Albault devas esti ĝustigataj kaj kompletigataj jene: Antaŭvideble ĝi havos 800 ĝis 1000 manuskriptajn paĝojn ne parolante pri la Indeksa Parto. Al la lingvoj A. F. G. H. R estos aldonata Pl., pro la eldonado en Pollando. Plie Prof. Suzuki preparas la parton J., kiu aperos — depende de la ebloj — kune kun la ĉefa parto (do plia volumo, plia indekso) aŭ aparte. Efektive dua volumo de la vortaro entenos diversajn indeksojn nacilingva-esperanta. Se ĝi ĝisvivos la aperon, BMV estos monumento de nia faka leksikologio.

621.3 **Elektrotekniko.** — Mag. inĝ. K. Siwicki (Varsovio) tradukis la »Grupon 40 — Apliko de la elektrovarmo« de la Internacia Elektroteknika Vortaro.

621.3 **Elektrotekniko.** — Dipl. inĝ. R. — L. Welther (Bukareŝto) donacis al la biblioteko de T. C. pliajn volumojn de la 9-lingva Moskva Eldono de la Internacional Electrotechnical Vocabulary (IEC-Vortaro), nome »Gr. 50 — Elektrokemio kaj elektrometalurgio« kaj »Gr. 65 — Radiologio kaj radiologia fiziko«. Eventuale la Teknika Sekcio de Pola Esperanto-Asocio (K. Siwicki) entreprenos esperantigi ankaŭ ĉi tiujn gravajn partojn de la IEC-Vortaro.

667.6 : 648.28 **Kemia Tekniko; Farboj; Kemia purigo.** — S-ro M. Führer, poŝtfako 191, CH-8055 Zürich, Svislando, alsendis ekzempleron de la fakrevuo »Der Chemischreiniger und Färber«. Tiu revuo, kiu estas unu el la plej gravaj en tiu fako tutmonde, depost januaro 1967 prezentas resumajn enkondukojn al ĉiuj fakartikoloj en Esperanto. De nun pro la iniciatemo de s-ano Führer, regule aperos resumoj en Esperanto en tiu revuo.

R. Haferkorn


**Haveblaj malnovaj kolektoj de SCIENCA REVUO**

**Respondante al plurfoja interesiĝo de niaj membroj ni povas respondi ke**

**Vol. 13, 14, 15 kaj 16 de Scienca Revuo**

**estas haveblaj laŭ la malplialtigita prezo:**

**por la membroj de ISAE 15 steloj, por aliaj 20 steloj**

**La antaŭajn volumojn de la revuo ni bedaŭrinde ne povas liveri, pro la nekomprenemo de la antaŭa eldonisto.**

**Vol. 17 estas havebla laŭ la normala abonprezo**

**(25 steloj por la membroj de ISAE, 30 steloj por aliaj)**

**Ne forgesu ke ankaŭ SCIENCAJ STUDOJ estas ankoraŭ haveblaj**

**(laŭ la malnova prezo de nur 50 steloj)**

**La pagojn faru plej bone pere de la delegita reto de ISAE.**